| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 24 n-ro 5(103) 20.10.1973. |
|---|---|



## LA VICPREZIDANTO DE I.S.A.E.

### CARL STØP-BOWITZ

### 60 - JARULO

Unu el la plej eminentaj esperantistoj en Norvegujo, proffesoro Carl Støp-Bowitz, prezidanto de NEL, naskiĝis en Eidsvoll, la 8-an de decembro 1913, do li ĵus fariĝis 60-jara; pro kio mi dediĉas kelkajn liniojn al lia biografio, kun la deziro ke li vivu ankoraŭ kelkajn jardekojn je bono de Esperanto-movado.

Post la gimnazio li studis naturscienon kaj matematikon ĉe la universitato en Oslo kaj li elektis zoologion kiel specialaĵon. En 1939 li fariĝis licenciato pri naturscienco. Longe li estis kuratoro de la Universitata Zoologia Muzeo en Oslo, poste dum kelkaj jaroj gimnazia lektoro. De 1966 li estas profesoro pri zoologio ĉe la Universitato de Oslo. Li doktoriĝis en 1970 per disertacio pri la norvegaj lumbrikedoj.

Li ricevis plurajn stipendiojn por zoologiaj esploroj kaj faris plurajn studvojaĝojn en diversaj landoj, i.a. en Japanujo - en 1965. Partoprenis la 14an Internacian Kongreson de Zoologio en Kopenhago 1953 kaj la 15an en Londono 1958.

Støp-Bowitz interesiĝis precipe pri la anelidoj kaj multe kontribuis al la esplorado de la polihetoj de la norvegaj kaj nord-atlantikaj bordoj, same de la pelagaj polihetoj de ĉiuj maroj. Krome li estas pioniro pri la esplorado de la Lumbrikedoj de Norvegujo; en la disvastiĝo de kelkaj el la specioj li trovis fortan subtenon al la teorio pri senglaciaj rifuĝejoj laŭ la norvegaj bordoj, kie organismoj povis travivi la glaciepokojn kvaternarajn, kaj li daŭre partoprenas la diskutadojn pri tiu teorio.

La rezultatojn de siaj sciencaj esploroj li publikigas en la traktaĵoj en franca aŭ angla lingvo, ĉiam kun resumo en Esperanto, kelkfoje en Esperanto kun resumo franca aŭ angla.

Plie li multe aktivis per artikoloj en gazetoj kaj revuoj pri zoologiaj temoj, kunlaboris en pluraj grandaj popularzoologiaj norveglingvaj verkoj kaj leksikonoj kaj estis ĉefredaktoro de la granda verko "Jordens Dyreliv" Vol. I-III, 1965.

Esperantista vivo de Støp-Bowiz komenciĝis jam antaŭ la studado, kiam li la unuan fojon (en 1928) aŭskultis la perradian kurson, kiun gvidis tiama leŭtenanto R.B.Paulsen kune kun la nederlanda f-ino T.Kissing.

En junio 1939 li partoprenis la grandan kurson en Oslo, gvidatan de pastro Andreo Ĉe. Tiu kurso daŭris nur du semajnojn, sed po 4 horoj ĉiutage. Post tiu kurso li kapablis paroli la lingvon preskaŭ tute flue. Lia aktiveco en Klubo Esperantista en Oslo videblas el la funkcioj: 1931-38 sekretario de la Klubo, 1939-40 vicprezidanto, 1940-47 prezidanto kaj 1947-62 la sekretario; en Norv. E-Ligo la sekretario (aŭ ĝen.sekr.) preskaŭ senĉese 1933-47 kaj de 1947 la prezidanto de NEL.

En ISAE C.Støp-Bowitz meritas multege por ĝia postmilita restarigo, estinte ĝia prezidanto 1946-49 kaj de tiam senĉese la vicprezidanto. Krom tio li estis en la Ekzamena Komisiono de NEL ĝia sekretario 1939-45 kaj post tio la prezidanto. Li portis la prezidantan ŝarĝon en LKK de la UK en Oslo 1952. Li estas membro de Akademio de Esperanto (direktoro de la Sekcio por Prononcado 1949-73). Oni elektadas lin konstante por B-komitatano de UEA de 1956. Li reprezentas NELn en Kunlabora Komisiono de Nordlandaj Esperanto-Asocioj. Li gvidis Lernejan Kampanjon de NEL kaj instruis Esperanton oficiale en gimnazio 1961.

Kune kun s-ro Isbrücker Støp-Bowitz verkis la libron "La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato" (Oslo,1948). Kaj kune kun Vilho Setälä kaj Ebbe Vilborg la gramatikan studon titolitan "Esperanto - moderna lingvo" (Helsinki 1965). Li estis kunlaboranto en pluraj vortaroj kaj ĉefkunlaboranto (pri zoologio) de la Plena Ilustrita Vortaro. Li multe okupiĝis ankaŭ pri la zoologia terminaro, precipe pri nomoj de animaloj, kaj i.a. ellaboris sistemon por esperantigo de la zoologia scienca nomenklaturo (Sc. Revuo, Vol.22, n-ro 3(89)). Krome li partoprenis, kiel komisiito de la Akademio, en la Komisiono pri ordigo de Geografiaj Nomoj, kunlaboris li ankaŭ en la Poŝatlaso de la Mondo.

Støp-Bowitz estas certe "ĝisosta" esperantisto, dedicanta ĉiun liberan minuton al la laboro por Esperanto. Li iam skribis ke "tago sen Esperanto estas perdita tago por mi", kaj li vere sekvis tiun devizon. Li gvidis multajn kursojn, verkis artikolojn, faris paroladojn kaj prelegis en Internacia Somera Universitato dum pluraj UK. Li faris serion da lekcioj "Bazaj nocioj pri biologio" en S.U.K. 1972, kaj jam planas 3 seriojn por la sesio de 1974. Pro tia sia laboro li fariĝis, en 1956, Komandoro I de la ordeno de NEL, PRO MERITO, kaj estas Majstro de la ordeno de 1956. Li ankaŭ trovis tempon por aktive partopreni en la movado por protektado de la ĝenerala norvega lingvo "Riksmål" kontraŭ la atencoj flanke de autoritatoj (situacio unika en la mondo!); pro meritoj sur tiu kampo li fariĝis honora membro de "Riksmålsforbundet".

CSIENCAJ PUBLIKIGAĴOJ de Prof.d-ro C.STØP-BOWITZ

(ĉiam kun resumo en Esperanto)

Les Glycériens de Norvège (Nytt Mag., 82, Oslo 1941).

Les Opéliens norvégiens (Nytt Mag., 85, Oslo 1945).

Les Scalibregmiens de Norvège (Nytt Mag., 85, Oslo 1945).

Les Flabelligériens norvégiens (Bergens Museums Aarbok 1946/47, Bergen 1948).

Sur les polychètes arctiques ... (Tromsø Museums Aàrsh., vol. 66, Oslo 1948).

Polychaeta from the "Michael Sars" North Atlantic Deep-Sea Exp. 1910 (Rep. Sci. Res. "M.S." N.A.D.-S. Exp. 1910, Vol. V, Bergen, 1948).

Polychètes pélagiques ... „Norvegia". (Sci. Res. Norw. Antarct. Exp. 1927-1928 et sqq., No. 31. D.N.Vid.-Ak., Oslo 1949).

Polychètes pélagiques de l'expédition suédoise antarctique 1901-1903. (Further Zool. Res. Swed. Antarct. Exp. 1901-1903, Vol. IV. Stockholm 1951).

Poliĥetaj novaĵoj el Norvegujo (Siencaj Studoj, Kopenhago 1958).

Did Lumbricids survive the quaternary glaciatiojn in Norway? (Pedobiologia, 9, Jena 1969).

A Contribution to Our Knowledge of the Systematics and Zoogeography of Norwegian Earthworms (Annelida Oligochaeta: Lumbricidae) (Nytt Mag. f. Zool., 17, Oslo 1969).

Earthworms (Annelida Oligochaeta: Lumbricidae) from Hardangervidda. (en preso).

Pelagaj poliĥetoj de la ekspedicioj de „Willem Barendsz" 1946-1947 kaj 1947-1948 kaj de „Snellius" 1929-1930. (en preso).

FINO DE MARTO 1974 - LIMDATO POR

**LA PREMIO POPOVIĈ**

Laŭ la ĝisnuna enhavlinio de Scienca Revuo, kies gvidlinio dum longa tempo restos certe tiu kia ĝi nun estas (ĉar la enketo antaŭ tri jaroj tion montris), la revuo devas havi trispecajn artikolojn: 1) popularsciencajn artikolojn el ĉiuj (naturscienca), humanismosciencaj kaj teknikaj) branĉoj, 2) originalesplorajn artikolojn kaj 3) referatajn artikolojn. Inter ili la unuaj estas nun plej oftaj. En la lastaj jaroj ne mankas multe ankaŭ la originalesploraj artikoloj. Sed maloftaj estas diversspecaj referataj artikoloj, donantaj bildon pri evoluo de iu scienca branĉo dum unu aŭ pluraj lasttempaj jardekoj, aŭ donantaj la ĉimomentan staton de la solvitaj, parte aŭ tute ne solvitaj, problemoj el difinita scienco, aŭ prezentantaj la plej gravajn atingaĵojn de unuopaj (aŭ pluraj, parencaj) sciencaj branĉoj.

Kaj ĝuste tiaj artikoloj estus plej bonvenaj por fake interesiĝantaj legantoj, plej utilaj por tiaj legantoj (kaj pro tio plej allogaj), kio plialtigus la reputacion de la Scienca Revuo. Konsiderante tion, mi trovis oportuna promesi iom pli altan sumon por stimuli verkadon de tiaj artikoloj. Estus falsa modesteco se tiel kreita premio ne portus mian nomon. Kaj el tio rezultas la

**KVARJARA KONKURSO**

**Al plej bona referata artikolo publikigota en Scienca Revuo dum la kvariara periodo de marto 1970 ĝis marto 1974. estos aljuĝita la monsumo de**

**6.000 (sesmil) steloj**

**kiel la »premio Popović«. La tiucelan monon disponigis al ISAE Prof. Bož. Popović (Beograd, Jugoslavio). La Estraro de ISAE nomigos fine de la jaro 1973 la 5-membran Premian Komitaton, kiu ĝis majo 1974. trarigardos ĉiujn tiajn artikolojn kaj proponos la premiotan artikolon al la Estraro de ISAE, kiu faros la findecidon. Se estos pluraj samniverlaj artikoloj, premio povos esti dividota je 2 aŭ 3 egalaj partoj. La solena transdono de la premioj okazos dum la Universala Kongreso.**

La teksto de ĉi-konkurso estu publikigata dufoje jare kaj la rezulto de la konkurso aperu en n-ro 3 aŭ 4 de Scienca Revuo por 1974.